

Ipl 60 (1/2007)

Enhavo

1	En Germanujo pli ol aliloke: Esperantologia agado (<i>Renato Corsetti</i>)	2
2	Revuoj.....	5
2.1	Language Problems & Language Planning (LPLP) 2006: La interlingvistika sekcio.....	5
2.2	Nova revuo: International Multilingual Research Journal	6
3	Novaj publikigaĵoj.....	6
3.1	Esperanto – Lingvo kaj Kulturo en Berlino 1903-2003. La Jubilea Libro	6
3.2	Esperanto-Gramatiko de Bertilo Wennergren	7
3.3	Aktoj de la 15-a GIL-konferenco (2005): Pri Lingvo-politiko kaj lingvo-kulturo.....	7
3.4	„English Next“ de David Gradoll (<i>Sabine Fiedler</i>).....	9
3.5	Luciano Canepari pri fonetiko, ankaŭ de Esperanto	12
3.6	Giordano Formizzi pri Komenio kaj la kulturaj radikoj de Esperanto (<i>Renato Corsetti</i>).....	12
3.7	Antologio pri la lingvistika skolo de Nikolaj J. Marr (Patrick Sériot)	13
3.8	Pri stilfiguroj en la poezio de Esperanto (Till Dahlenburg).....	13
3.9	Romano pri kaj kun Volapük (<i>Peter Burnett</i>)	13
3.10	„La lingvo estas la animo de popolo“ (Baier/Zink).....	14
3.11	Novaj eldonaĵoj de la Eldonejo Helmut Buske en 2007	14
4	Projekto pri enciklopedio: La originala Esperanta literaturo (<i>Geoffrey Sutton</i>).....	15

Ipl informas pri interlingvistikaj aktivecoj kaj publikigaĵoj, inkluzive lingvo-politikaj. La redaktoro nur mencias materialojn, kiujn li ricevis en la originalo aŭ kiel kopion. La bulteno estas bibliografie orientita, tamen ankaŭ publikigas recenzojn, raportojn kaj aliajn materialojn. Ipl estas senpage havebla ĉe C.O. de UEA.

1 En Germanujo pli ol aliloke: Esperantologia agado¹

Renato Corsetti

En Germanujo pli ol en aliaj landoj oni sukcesis kunmeti elementojn, kiuj kutime restas disaj: scienca interesiĝo pri esperanto kaj aliaj planlingvoj, lingvistaj fak-scioj de neesperantistaj kaj esperantistaj lingvistoj kaj scienc-organizaj kapabloj. Tiel naskiĝis la „Gesellschaft für Interlinguistik“² (GIL), kiu ĉiujare aranĝas siajn konferencojn, kiujn partoprenas ĝuste esperantistaj kaj neesperantistaj lingvistoj (de la 1-a ĝis 3-a de decembro 2006 okazis la 16-a konferenco pri la temo „Esperanto heute – wie aus einem Projekt eine Sprache wurde“ [Esperanto nuntempe – kiel el projekto fariĝis lingvo]).

La ĉi-tie preparolataj Beihefte (eble ni traduku tion simple per 'Kajeroj') estas la aktoj de tiuj konferencoj³. Kiel la konferencoj mem ili ne havas limigitan temon, eĉ se ili daŭre restas en la kampo de scienca interlingvistiko, sed varias de politik-lingvistiko, kiel la 6-a kajero, al leksikografio, kiel la 5-a kajero, al pli pure interlingvistikaj temoj, kiel la 2-a aŭ la 8-a.

Ne eblas, tamen, kompreni la gamon sen konsiderado de la titoloj. Jen ili:

- 1 *Translation in Plansprachen* [Tradukado en planlingvoj], 1996, aktoj de la 5-a konferenco 1995.⁴
- 2 *Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik*, [Terminologio-sciencaj aspektoj de interlingvistiko], 1997, aktoj de la 6-a konferenco 1996.
- 3 *Eine Sprache für die Wissenschaft?* [Unu lingvon por la scienco?], 1998, aktoj de ekstera GIL-konferenco, organizita komune kun Humboldt-Universitato Berlino kaj Wilhelm-Ostwald-Societo Großbothen pri la interlingvistikaj konceptoj de Wilhelm Ostwald, 1996.⁵
- 4 *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen* [Socikulturaj aspektoj de planlingvoj], 1998, aktoj de la 7-a konferenco 1997.
- 5 *Interlinguistik und Lexikographie* [Interlingvistiko kaj leksikografio], 1999, aktoj de la 8-a konferenco 1998.
- 6 *Sprachenpolitik in Europa* [Lingvopolitiko en Eŭropo], 2001, aktoj de la 9-a konferenco 1999, komune organizita kun „Verein zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V.“ [Societo por Progresigo de Lingvistikaj Studoj en Berlin].
- 7 *Zur Struktur von Plansprachen* [Pri la strukturo de planlingvoj], 2001, aktoj de la 10-a konferenco 2000.

¹ La originala artikolo aperis en „Esperantologio – Esperanto Studies“ (ESF), n-ro 3 (2005), p. 40-44. Mi represas ĝin kun la afabla permeso de la aŭtoro d-ro Renato Corsetti kaj la redaktoro de ESF, prof. Christer Kiselman. Mi nur aktualigis la temojn de la “Beihefte” kaj aldonis kelkajn esperantigojn de germanaj titoloj. (Red.)

² En Esperanto: „Societo pri interlingvistiko“. Temas pri ŝtate registrita kaj (pro scienca laboro) komunutila societo

³ *Beihefte*, numeroj 1-13, Berlino: GIL, ISSN 1432-3567, varia nombro de paĝoj sed ĝenerale pli ol cent, foje pli ol 200; malsamaj prezoj sed proksimume 15 eŭroj por la lastaj kajeroj kaj 10 eŭroj por la unuaj, foje maksimume 18 eŭroj. Redaktintoj de la unuaj kvin kajeroj estis *Ulrich Becker* kaj de la lastaj 8 *Detlev Blanke*. La enhavtabelojn de la kajeroj oni trovas ĉe www.interlinguistik-gil.de/beihefte.html.

Aldono de la Red.: Ĉe “Beihefte” temas pri “Kromkajeroj” al “Interlinguistische Informationen” [IntI]. Fakte IntI estas relative modesta bibliografie orientita bulteno (A5-formata), aperanta en kvar numeroj jare. La “Krom”kajeroj estas A4-formataj. Ĉiuj aktoj ankoraŭ estas haveblaj ĉe UEA aŭ rekte ĉe GIL per la adreso de Detlev Blanke (Otto-Nagel-Str. 110. D-12683 Berlin, dblanke.gil@snafu.de).

⁴ Ni bedaŭrinde ne publikigis la aktojn de la unuaj kvar konferencoj. (Red.)

⁵ La Kajeroj 3 kaj 10 enhavas aktojn de aliaj konferencoj, ne tiujn de la jarkonferencoj de GIL.

- 8 *Plansprachen und ihre Gemeinschaften* [Planlingvoj kaj iliaj komunumoj], 2002, aktoj de la 11-a konferenco 2001.
- 9 *Plansprachen und elektronische Medien* [Planlingvoj kaj elektronikaj medioj], 2003, aktoj de la 12-a konferenco de GIL 2002.
- 10 *ProCom '98. Sektion "Terminologiewissenschaftl und Plansprachen"*, [Sekcio "Terminologio kaj planlingvoj"], 2003. Aktoj de internacia konferenco okaze de la cent-jariĝo de la naskiĝo de Eugen Wüster, 1998 en Vieno; [kp. la konferencraporton en la revuo Esperanto 10/1998: 180-181, krome la materialojn en IpI n-ro 26 [3/1998]].
- 11 *Spracherfindung — Sprachplanung — Plansprachen* [Lingvo-inventado — lingvo-planado — planlingvoj], 2004; aktoj de la 13-a konferenco 2003.
- 12 *Internationale Plansprachen — Entwicklung und Vergleich* [Internaciaj planlingvoj — evoluo kaj komparo], 2005, aktoj de la 14-a konferenco 2004.
- 13 *Sprachenpolitik und Sprachkultur* [lingvo-politiko kaj lingvo-kulturo], 2006, aktoj de la 15-a konferenco, komune organizita kun „Verein zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V.“ [Societo por Progresigo de Lingvistikaj Studoj en Berlin], 2005.

Kaj ne eblas kompreni la riĉecon de la enhavo se oni ne konsideras la enhavon de almenaŭ du el ili hazarde elektitaj.

La kvara kajero: *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen [socikulturaj aspektoj de planlingvoj]*

Tazio Carlevaro: Das soziokulturelle Selbstverständnis der wichtigsten Plansprachen außer Esperanto [la socikultura memkompreno de la ĉefaj planlingvoj ekster Esperanto]

Otto Back: Gedanken über die deutsche Orthographiereform und ihre Kritiker [pensoj pri la reformo de la germana ortografio kaj ties kritikantoj]

Sabine Fiedler: Zu Merkmalen der Esperanto-Sprachgemeinschaft. Ergebnisse einer Probandenbefragung. [Pri ecoj de la esperanta lingvo – komunumo. Rezultoj de enketo ĉe referenculoj]

Werner Bormann: Die Esperanto-Bewegung in den gesellschaftlichen Strömungen ihrer Zeit (Ein Bericht aus eigener Erfahrung) [la esperanto-movado en la sociaj fluoj de sia tempo – raporto el propra sperto]

Helmut Welger: Plansprachliche Gütekriterien und ihre Konkretisierung und Gewichtung bei Zamenhof [planlingvaj kvalit-kriterioj kaj ilia konkretiĝo kaj prijuĝo ĉe Zamenhof]

Tazio Carlevaro: Apprender Interlingua [lernu Interlingua], prezentita en Interlingua.

Tazio Carlevaro: Andreas Juste — idista poeto, prezentita en Ido.

Věra Barandovská-Frank: Der neueste Stand der Lateinbewegung: Bericht über den Latinisten-Weltkongress [la plej aktuala stato de la movado por la Latina – raporto pri la monda kongreso de latinistoj]

Johannes Irmscher: Soziokulturelle Aspekte der griechischen Reinsprache [socikulturaj aspektoj de la greka normlingvo]

Dieter Dungert: Die Bildung von Verben in Esperanto aus substantivischen Wortstämmen im Esperanto [la formado de verboj en Esperanto el substantivaj radikoj]

Ronald Löttsch: Zwölf Thesen und zwei Texte zu einer alternativen deutschen Rechtschreibung [dekdu tezoj kaj du tekstoj pri alternativa germana ortografio]

La sesa kajero: *Sprachenpolitik in Europa,*

Teil I [Lingvo-politiko en Eŭropo]:

Erika Ising: Begrüßungs- und Eröffnungsansprache [saluta kaj malferma parolado]

Detlev Blanke: Eröffnungsansprache [malferma parolado]

Max Hans-Jürgen Mattusch: Sprachenvielfalt — Fluch oder Segen? [lingva diverseco – malbeno aŭ beno?]

Ronald Löttsch: Zum typologischen Reichtum europäischer Sprachen [pri la tipologia riĉeco de eŭropaj lingvoj]

Vitalij G. Kostomarov: Das Russische als internationale Verkehrssprache [la rusa kiel internacia lingvo]

Johannes Klare: Sprachenpolitik aus französischer Sicht [lingvo-politiko laŭ franca vidpunkto]

Detlev Blanke: Plansprachen und Europäische Sprachenpolitik [planlingvoj kaj eŭropa lingvo-politiko]

Jürgen Scharnhorst: Nachwort zur Tagung "Sprachenpolitik in Europa" [postparolo al la konferenco „Lingvo-politiko en Eŭropo“]

Detlev Blanke kaj Jürgen Scharnhorst: Auswahlbibliographie zur europäischen Sprachenpolitik [elekta bibliografio pri la eŭropa lingvo-politiko]

Teil II (dua aparto)

Věra Barandovská-Frank: Gibt es Europa? Was ist europäisch? [Ĉu Eŭropo ekzistas? Kio estas eŭropa?]

Sabine Fiedler: Bela dam', ĉu al vi plaĉus, se akompanon mi kuraĝus? Zur Übersetzung von Goethes Faust ins Esperanto [...Pri la traduko de Faŭsto de Goethe en Esperanto]

Karl-Hermann Simon kaj Ingward Ullrich: Erfahrungen bei der terminologischen Bearbeitung der forstlichen Fachsprache. [spertoj ĉe la terminologia prilaborado de la forsta faklingvo]

Kiel oni povas klare vidi, tiuj kajeroj celas ĉefe la germanlingvan publikon kaj GIL fakte agas ĉefe en Germanujo. Hazarde de tempo al tempo oni povas trovi artikolon en alia lingvo ol la germana, sed baze temas pri germanlingvaj materialoj. Ili estas relative modeste produktataj, sed la limigiteco de la publiko por tiu, kaj por aliaj, fakaj, tre specialaj kampoj ne permesas pli luksajn eldonojn, kiuj cetere apenaŭ estas pravigeblaj por sciencaj libroj. Ili ankaŭ ne aparte celas "normalajn" esperantistojn, sed nur tiujn, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko. En sia kampo, tamen, ĉi tiuj kajeroj montras, kion oni povas atingi, se oni science alfrontas la problemon de esperanto kaj de planlingvoj.

La longe serĉata aprobo de lingvistoj en malgranda skalo jam ŝajnas esti realo en Germanujo.

Se oni atente ekzamenas la liston de la parolantoj en la konferencoj de GIL oni vidas ke duono konsistas el neesperantistaj lingvistoj, kiuj akceptas partopreni konferencon, en kiu la tono certe ne estas "samideana", sed en kiu ja partoprenas pluraj lingvistoj, kiuj estas konataj kiel esperantistoj. Cetere la plurjardeka batalo por doni al la scienco "interlingvistiko" la dignon de scienco ankoraŭ ne

finiĝis. Nuntempe, se oni parolas en naciaj lingvistaj medioj pri "interlanguage", tio pri kio la homoj pensas, estas ĉefe la pluraj stadioj de la lernantlingvo popularigita de Gass kaj Selinker.

Malantaŭ la kajeroj staras ankaŭ granda laboro. Ne nur tiu de la redaktintoj, *Ulrich Becker* kaj *Detlev Blanke*, kiuj ankaŭ meritas laŭdon pro la atento de la redaktado, sed ĉefe temas pri la scienc-organiza laboro de D. Blanke, kiu sukcesis kunmeti kaj kunteni la tutan teamon. Cetere li estas ankaŭ la eldonanto de la germanlingva „Interlinguistische Informationen“⁶, kiu estas la bulteno de GIL en Germanujo.

Estas bedaŭrinde, ke simila laboro de rilatado je la ĝusta nivelo kun lingvistoj neesperantistaj ne okazas en aliaj landoj. Kompreneble ekzistas esceptoj, kaj en Italujo mem la esperanto-movado faras ion alimaniere rekte kiel esperanto-movado: de tempo al tempo oni kontaktas italajn lingvistojn⁷, invitas ilin prelegi, ktp. En Hungarujo kaj en Pollando ankaŭ estas rilatoj kun la nacia lingvista rondo, kaj laste tre bonaj novaĵoj venas el Japanujo. Sed ĝenerale oni devas konstati, ke la organiziĝemo de esperantistaj interlingvistoj ne estas tre alta kaj la deziro alparoli neesperantistajn kolegojn estas ankaŭ ne tre granda.

Pro tio la agado de GIL ne nur estas valora en si mem rilate al Germanujo, sed valoras ankaŭ kiel ekzemplo de tio, kion oni povas atingi, se oni sukcesas kunmeti sciencan interesiĝon pri esperanto kaj aliaj planlingvoj, lingvistajn faksciojn de neesperantistaj kaj esperantistaj lingvistoj kaj scienc-organizajn kapablojn.

2 Revuoj

2.1 Language Problems & Language Planning (LPLP) 2006: La interlingvistika sekcio

La lingvopolitika revuo „Language Problems & Language Planning“ enhavas interlingvistikan sekcion („Interlinguistics/Interlingüística/Interlinguistik/Interlingvistiko“), kiun redaktas *Mark Fettes*. La jarkolekto 2006 de LPLP en tiu sekcio entenas jenajn materialojn:

LPLP 30, Nr. 1 (Spring 2006)

Müller-Saini, Gotelind/Benton, Gregor (2006): Esperanto and Chinese anarchism 1907-1920: The translation from diaspora to homeland, p. 45-73

LPLP 30, Nr. 2 (Summer 2006)

Müller-Saini, Gotelind/Benton, Gregor (2006): Esperanto and Chinese anarchism in the 1920s and 1930s. p. 173-192.

LPLP 30, Nr. 3 (Fall 2006)

Becker, Ulrich (2006): Publishing for a diaspora: The development of publishing in the international Esperanto movement, p. 269-301.

2.2 Nova revuo: *International Multilingual Research Journal*

Ni ricevis informojn pri nova revuo, kiu certe ankaŭ interesos interlingvistojn kaj aliajn lingvopolitike interesitajn personojn. Temas pri „International Multilingual Research Journal“.

Jen la detaloj:

Adreso: <http://imrj.asu.edu/>

Eldonantoj: Terrence G. Wiley and Alfredo J. Artiles, Lawrence Erlbaum Associates in cooperation with Arizona State University

⁶ Ĝis fino de 2006 entute aperis 61 numeroj de la bulteno- Red.

⁷ Pri tio vidu la artikolon de Federico Gobbo en IpI 56 (1/2006)-Red.

Scope and Purpose

The International Multilingual Research Journal (IMRJ) invites scholarly contributions with strong interdisciplinary perspectives to understand and promote bi/multilingualism, bi/multi-literacy, and linguistic democracy. The journal's focus is on these topics as related to languages other than English as well as dialectal variations of English. It has three thematic emphases: The intersection of language and culture, the dialectics of the local and global, and comparative models within and across contexts. The IMRJ is committed to promoting equity, access, and social justice in education, and to offering accessible research and policy analyses to better inform scholars, educators, students, and policy makers.

The IMRJ is particularly interested in scholarship grounded in interdisciplinary frameworks that offer insights from linguistics, applied linguistics, education, globalization and immigration studies, cultural psychology, linguistic and psychological anthropology, sociolinguistics, literacy studies, post-colonial studies, critical race theory, and critical theory and pedagogy. It seeks theoretical and empirical scholarship with implications for research, policy, and practice.

Submissions of research articles based on quantitative, qualitative, and mixed methods are encouraged. The journal includes book reviews and two occasional sections:

Perspectives and Research Notes. Perspectives allows for informed debate and exchanges on current issues and hot topics related to bi/multilingualism, bi/multi-literacy, and linguistic democracy from research, practice, and policy perspectives. Research Notes are shorter submissions that provide updates on major research projects and trends in the field.

3 Novaj publikigaĵoj

3.1 Esperanto – Lingvo kaj kulturo en Berlino 1903-2003. La Jubilea Libro

Okaze de la 100-jariĝo de la Esperanto-movado en Berlino (2003) *Fritz Wollenberg* redaktis libron, kiu per multaj ĉapitroj prilumas la Esperanto-vivon en Berlino, la rolon de gravaj personoj, la kontribuon, kiun Berlino donis al la germana kaj internacia movado.

La libro estas riĉe ilustrita. La tre detala enhavo-tabelo kaj la personindekso faciligas la orientiĝon. La tekstoj aperas alterne en la germana aŭ en Esperanto. La esperantaj tekstoj havas germanan resumon, la germanaj tekstoj havas esperantan resumon:

Wollenberg, Fritz (2006, Red.): Jubilea libro. 1903-2003. Esperanto – lingvo kaj kulturo en Berlino. New York: Mondial, 368 p., ilustrita, nomindekso, 19 EUR.

Ĉefa enhavo:

- Antaŭvorto de la prezidanto de Esperanto-Ligo Berlin
- 1. Enkonduko en la Jubilean Libron
- 2. Jubilea programo 21a - 23a de nov. 2003
- 3. Salutmesaĝoj al ELB okaze de la jubileo (i.a. de la ĉefurbestro de Berlino)
- 4. La Pola Instituto Berlin - nia ĉefa jubilea aranĝloko
- 5. La lingvo vivas en renkontiĝoj de la parolantoj
- 5.1. Renkontiĝante en Berlin
- 5.2. Berlinanoj vojaĝas en Germanio kaj tutmonde
- 6. Esperanto-libroj kaj ĵurnaloj en Berlin
- 6.1. Originala literaturo en Esperanto el Berlin
- 6.2. Beletraj Esperanto-tradukoj el Berlin
- 6.3. Franca kaj rusa Esperanto-romanaŭtoroj verkis pri Berlin
- 6.4. Eldonejoj en Berlin eldonas literaturon en kaj pri Esperanto
- 6.5. Ĵurnaloj en Esperanto el Berlin
- 6.6. Berlinaj geesperantistoj skribas por internaciaj kaj germanaj ĵurnaloj

- 6.7. Esperanto-kolektaĵoj en Berlin
- 7. Pli da Esperanto-kulturo
- 8. Sciencistoj en Berlin uzas kaj esploras Esperanton
- 9. Lerni Esperanton en Berlin
- 9.1. Esperanto-kursoj kaj lernmaterialoj en Berlin
- 9.2. Esperanto-instruistoj en Berlin
- 10. Esperanto-organizaĵoj kaj projektoj
- 10.1. Esperanto-grupoj kaj renkontiĝejoj
- 10.2. Esperanto-projektoj en Berlin
- 10.3. Esperanto-Ligo Berlin - la tegmento por multaj grupoj kaj projektoj
- 10.4. Naciaj kaj internaciaj organizaĵoj en Berlin
- Indekso de personoj.

La libro estas mendebla ĉe UEA.

3.2 Esperanto-Gramatiko de Bertilo Wennergren

Antaŭ nelonge aperis la ĝis nun plej ampleksa unulingva gramatiko de Esperanto:

Wennergren, Bertilo (2005): Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. El Cerrito: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. ISBN 0-939785-07-2. 696 p., 26 EUR

La ampleksa enhavtabelo kaj detala temindekso faciligas la orientiĝon en tiu ĉi unika manlibro, kiu estas destinita por la praktika esperantisto, malpli por lingvisto. La gramatiko uzas propran terminologion, kiu certe mirigos la lingviston. Sed ĝi funkcias laŭ la koncepto de la aŭtoro. En aparta listo la aŭtoro krome klarigas siajn esprimojn per tradiciaj gramatikaj terminoj. Tre ofte li donas fontindikojn pri uzitaj ekzemplo.

La gramatiko de Wennergren antaŭe nur ekzistis en la reto kaj tie estas daŭre trovebla kun multaj aldonoj, komentoj k.s. (<http://bertilow.com>). Sed la printeldono sendube estas granda evento.

3.3 Aktoj de la 15-a GIL-konferenco (2005) pri lingvo-politiko kaj lingvo-kulturo

GIL estas la mallongigo por la germana scienca organizaĵo kun la nomo „Gesellschaft für Interlinguistik“ (Societo pri Interlingvistiko), kiu ekde 1992 ĉiujare okazigas siajn konferencojn kaj eldonas la aktojn. En 2005 GIL okazigis sian konferencon sub la temo „Lingvopolitiko kaj lingvo-kulturo“ (28.-30.11.2005, kp. IpI 55) kune kun la lingvistika organizaĵo en Berlin: “Verein zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V.“ VFoS (Societo por Progresigo de Lingvistikaj Studoj). En tiu societo membras multaj gravaj lingvistoj. Parto el ili partoprenis la GIL-Konferencon.

Valoras mencii, ke la internacie konata eldonejo Peter Lang, kiu realigas ampleksan lingvistikan programon, jam antaŭ la konferenco, post informiĝo pri ĝia programo kaj la prelegontoj en la retejo de GIL, tute meminciate kaj sen financaj postuloj sin proponis por eldoni la aktojn libroforme. Jürgen Scharnhorst kaj Detlev Blanke nun estas redaktantaj la libron, kiu aperos meze de 2007.

La aktoj intertempe aperis, kiel kutime. Por la membroj de GIL ili enestas en la jara kotizo, same kiel la bulteno „Interlinguistische Informationen“:

Blanke, Detlev/Scharnhorst, Jürgen (2006, Eld.): Sprachenpolitik und Sprachkultur. [Lingvopolitiko kaj lingvo-kulturo]. Interlinguistische Informationen. Beiheft 13. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 216 p., glubindita, A4 formato, 18 EUR.

Jen la enhavo (kun esperanta traduko por la legantoj de IpI):

- Vorwort (Antaŭparolo) *Detlev Blanke/Jürgen Scharnhorst*

Teil I: Tagung "Sprachenpolitik und Sprachkultur" (Parto I: Konferenco "Lingvo-politiko kaj lingvo-kulturo")

- Einführung in das Konferenzthema (Enkonduko en la konferencan temon)

Jürgen Scharnhorst (Prezidanto de la Societo por Subtenado de Lingvistikaj Studoj)

- Das Europa der Sprachen – Motive und Erfahrungen der Europäischen Sprachföderation EFNIL (La Eŭropo de la lingvoj – Motivoj kaj spertoj de la Eŭropa Federacio de Naciaj Institutoj Lingvistikaj (European Federation of National Institutes of Linguistics, EFNIL)

Gerhard Stickel (iama direktoro de la Instituto por Germana Lingvo, Mannheim, prezidanto de EFNIL)

- Sprachkultur und Sprachenpolitik in der Romania (Lingvo-kulturo kaj lingvo-politiko en Romanlingvujo)

Johannes Klare (Humboldt-Universitato Berlin)

- Das Niederländische im Kontext der europäischen Sprachenpolitik (La nederlanda lingvo en la kunteksto de la eŭropa lingvo-politiko)

Wim Jansen (Universitato de Amsterdam)

- Sprachenpolitik in der Tschechischen Republik – unter besonderer Berücksichtigung der Beziehungen zur EU und zum Europarat (Lingvo-politiko en la Ĉeĥa Respubliko kun aparta konsidero de la rilatoj al Eŭropa Unio kaj Eŭropa Konsilantaro)

Vít Dovalil (Karol-Universitato Praha)

- Englisch-Kompetenz in Deutschland (Kompetenteco pri angla lingvo en Germanio)

Rudolf-Josef Fischer (Universitato Münster)

- Sprachenpolitische Aspekte internationaler Plansprachen – Unter besonderer Berücksichtigung des Esperanto (Lingvo-politikaj aspektoj de internaciaj planlingvoj – Kun aparta konsidero de Esperanto)

Detlev Blanke (Humboldt-Universitato Berlin)

- Schlusswort zur Tagung "Sprachenpolitik und Sprachkultur" (Fermaj konkludoj pri la konferenco "Lingvo-politiko kaj Lingvo-kulturo")

Jürgen Scharnhorst

- Literatur zum Thema "Sprachenpolitik und Sprachkultur" – Auswahl (Elektita literaturo pri la temo "Lingvo-politiko kaj lingvo-kulturo")

Jürgen Scharnhorst

- Angewandte Sprachkultur: Der "Verein zur Förderung Sprachwissenschaftlicher Studien e.V." (1991-2006). (Aplikata lingvo-kulturo: La Societo por Progresigo de Lingvistikaj Studoj (1991-2006)

Jürgen Scharnhorst

Teil II: Weitere Beiträge der 15. GIL-Tagung (Parto II: Pluaj kontribuoj de la 15-a GIL-Konferenco)

- Aufbruchstimmung vor hundert Jahren. Der Erste Esperanto-Weltkongress in Boulogne sur Mer (Etoso de ekaktivemo antaŭ cent jaroj. La Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Mar)

Ulrich Lins (Germana Akademia Interŝanĝo-Servo)

- Rhetorische Stilfiguren in der Poesie des Esperanto (Retorikaj stilfiguroj en la poezio de Esperanto)

Till Dahlenburg (Brüel)

- Zum Projekt eines linguistischen Wörterbuches in der Internationalen Sprache (Pri la projekto de lingvistika vortaro en la Internacia Lingvo)

Cyril Brosch (Humboldt-Universität Berlin)

- Autoren (autoŝoj)

- Inhalt der Akten 1-12 (Enhavtabeloj de la aktoj 1-12).

La aktoj estas haveblaj ĉe UEA aŭ rekte ĉe la prezidanto de GIL (dblank.gil@snafu.de).

3.4 English Next (David Gradoll)

Sabine Fiedler

Gradoll, David (2006): English Next. Why Global English May Mean the End of 'English as a Foreign Language'. The British Council

(En la reto ĉe: www.britishcouncil.org/learning-research-englishnext.html)

La aŭtoro certe estas konata al multaj legantoj pro sia publikaĵo “The Future of English” (1997), en kiu li skizas la rolon de la angla en la mondo kiel kompleksan kaj varioplenan vojon.

En ĝi troviĝas ne nur faktoj kaj dokumentoj pri la angla kiel plej ofte lernata fremdlingvo, la lingvo, kiu dominas amaskomunikilojn kaj sciencajn publikaĵojn, sed ankaŭ kontraŭajn tendencojn, kiel ekz. mal-kreskantajn kvotojn de la angla en la reto aŭ la fakton ke por la junularo la simbola funkcio de la angla ofte pli gravas ol la komunika.

Per tiu nuancita kaj problemkonscia prezentado la verko de *David Gradoll* agrable kontrastas kun la libro de *David Crystal* el la sama jaro “English as a Global Language” (1997, dua eldono 2003), en kiu *Crystal* nediferencigante priskribas la estontan evoluon de la angla lingvo kiel nehaltigeblan triumfiron:

In my view the momentum of growth has become so great that there is nothing likely to stop its continued spread as a global lingua franca, at least in the foreseeable future (2003: p. X).

(Laŭ mi la nuntempa kresko fariĝis tiom forta, ke verŝajne nenio ekzistas, kiu haltigos la kontinuan disvastiĝon kiel tutmondan lingua franca, almenaŭ ne en la antaŭvidebla estonteco“).

En “English Next” nun Gradoll daŭrigas sian rigardadon de la estonteco. Li prilumas demografiajn kaj sociajn evoluojn same kiel ekonomiajn kaj teknologiajn.

Gradoll argumentas, ke la angla lingvo en sia internacia formo prezentos danĝeron por sia propra estonta evoluo.

Laŭ la analizoj de Gradoll en la sekvontaj jaroj la nombro de lernantoj plu kreskos ĝis ĝi atingos sian kulminon kun du miliardoj; post tio, proksimume en 2010, komenciĝos saturaĵo de la merkato kaj la nombro falos. Tiam en multaj landoj la angla estos ŝanĝiĝinta el instruprograma elemento ‘fremdlingvo’ al baza parto de edukado, kio havos konsekvencojn por la hegemonia pozicio de la lingvo:

The competitive advantage which English has historically provided its acquirers (personally, organisationally, and nationally) will ebb away as English becomes a near-universal basic skill. The need to maintain the advantage by moving beyond English will be felt more acutely.” (Gradoll 2006: 15)

(La konkurenckapabla avantaĝo, kiun historie al la angla donis ĝiaj alprenintoj (el vidpunto por personoj, organizaĵoj kaj nacioj) malpliĝos, kiam la angla fariĝos kutima universala baza kapablo. Oni pli akre sentos la neceson konservi la avantaĝon moviĝante ekster la limojn de la angla.)

Lige kun tio, Gradoll parolas pri paradigma ŝanĝo rilate la rolon de la angla, kiu ankaŭ kondukas al novaj kondiĉoj por edukado. Pro tio en la dua parto de la libro novaj modeloj de instruado de la angla estas diskutataj. La libro enhavas multnombrajn tabelojn kaj ilustraĵojn.

Enhavtabelo

3.5 Luciano Canepari pri fonetiko, ankaŭ de Esperanto

Estas konate, ke la grava itala lingvisto kaj fonetikisto Luciano Canepari ankaŭ bone konas Esperanton kaj tenas kontakton kun italaj esperantistoj. Li fojfoje prelegas pri interlingvistikaj temoj.

Antaŭ nelonge aperis libro, kiu meritas ankaŭ la atenton de esperantologoj:

Canepari, Luciano (2005): A Handbook of Pronunciation. English, Italian, French, German, Spanish, Portuguese, Russian, Arabic, Hindi, Chinese, Japanese, Esperanto. München: Lincom Europa, 436 p., ISBN 3 89586 481 1., 145 EUR.

Canepari dediĉas relative ampleksan ĉapitron al Esperanto (p. 392-412), kiu taman enhavas kelkajn kuriozaĵojn. Post la priskribo de la fonemsistemo de Esperanto li donas anglan tekston kun indikoj, kiel ĝin prononcus esperantisto (kiuspeca??). Sekvas teksto en Esperanto kaj Canepari donas ekzemplojn, kiel tiun tekston prononcas esperantisto (?) aŭ nekonanto de Esperanto (?) brita, usona, itala, franca, germana, hispana, brazila, portugala, rusa, araba, hinda, ĉina kaj japana.

Estus bone, se esperantologoj, kiuj kaj estas fonetike trejnitaj kaj informitaj kaj bone konas la lingvon, povus komenti la ĉapitron.

3.6 Giordano Formizzi pri Komenio kaj la kulturaj radikoj de Esperanto

Renato Corsetti

Formizzi, Giordano (2006): Le radici culturali dell'esperanto - La kulturaj radikoj de Esperanto - La pedagogia di Giovanni Amos Comenio - La pedagogio de Johano Amoso Komenio, Verona: Il Segno dei Gabrielli Editori, 160 p, 12 EUR, mendebla ĉe Itala Esperanto-Federacio, fei@esperanto.it

"Nulla sit radix, a qua non et Nomina ed Adnomina, et Verba ed Adverbia formentur: eritque Lingua facundissima, ad omnia exprimendum sufficientissima, simulque facillima utpote perpetuo analoga." Tio estas: "Ne estu radikoj, el kiuj oni ne povas formi substantivojn (o-vortojn, se vi preferas tiun terminaron), adjektivojn, verbojn kaj adverbojn. Ĝi estos tre riĉa lingvo, tre sufiĉa por esprimi ĉion kaj samtempe tre facila ĉar absolute regula."

Ne temas pri Zamenhof en la Fundamento sed pri Komenio en *Novae Harmonicae Linguae Tentamen Primum* (Unua Skizo pri la Nova Harmonia Lingvo). Komenio skribis en la unua duono de la 17-a jarcento, do ne nur multe pli frue ol Zamenhof sed ankaŭ pli frue ol preskaŭ ĉiuj aliaj pensantoj pri monda lingvo.

Pri liaj ideoj rilate al la bezono de internacia lingvo kaj pri lia tute malgranda praktika provo skizi la lingvon, *Giordano Formizzi*, unu el la plej konataj italaj sciencistoj pri Komenio (liaj tradukoj al la itala de la latinaj tekstoj de Komenio estas uzataj en la kursoj en italaj universitatoj), kunmetis tre valoran libreton. Temas pri enkonduka teksto por enkadrigi la ideojn de Komenio, kiu, cetere kiel Zamenhof, interesiĝis pri monda lingvo nur kiel ilo por atingi klarecon kaj pacon en la mondo. La lingvo estis ilo por la vera celo. Kaj temas poste pri la originalaj prilingvaj tekstoj de Komenio en la latina kun traduko al la itala kaj al Esperanto, el la verkoj *Novissima Linguarum Methodus* (Tutnova Metodo por Lerni Lingvojn), *Via Lucis* (La vojo de la lumo), *Panegersia* (Panegersio), *Panglottia*

(Panglotio) kaj *Novae Harmonicae Linguae Tentamen Primum* (Unua skizo de nova harmonia lingvo).

La verko estis pretigita okaze de la 91-a Universala Kongreso en Florenco en 2006, kaj tute aparte okaze de la stud-tago honore al *Bruno Migliorini*, aranĝita en la Universitato de Florenco kunlabore inter la Akademio de Esperanto kaj la Akademio de la Itala Lingvo (Accademia della Crusca laŭ la nomo pli mapli de la epoko de Komenio). Neciteble longa listo de italaj esperantistoj kunlaboris pri la tradukoj al Esperanto.

Mi mem povas nur aprobi la bazan ideon de Formizzi: la kulturaj radikoj de Esperanto estas serĉindaj tre malproksime en la tempo. Temas pri ideoj, kiuj bezonis jarcentojn por atingi praktikan realigon, sed kiuj ne realiĝus sen la jarcentoj da pli frua pripensado kaj laborado. Estas bele konstati en ĉi tiu verko, kiom samis la celoj de Zamenhof kaj de Komenio, kaj kiom samis iliaj ideoj pri la simpleco kaj reguleco de la kreataj lingvoj.

(Renato Corsetti, Via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina, Italujo <renato.corsetti@esperanto.org>)

3.7 Antologio pri la lingvistika skolo de Nikolaj J. Marr

En la svisa Universitato de Lausanne (Instituto por slavaj lingvoj) i.a. laboras la slavisto *Patrick Sériot*, kiu publikigis diversajn studojn pri la historio de la sovetia lingvo-scienco.

De la 1-a ĝis 3-a de Julio 2004 en la konferenca centro Crêt-Bérard (Svisio) sub gvido de Sériot okazis kolokvo, kiu estis dediĉita al la verko de la forte pridisputita sovetia lingvotioriisto kaj kaŭkaziisto *Nikolaj Jakovlevic Marr* (1864-1934). Marr dum jardekoj havis lamigan influon al la sovetia lingvistiko. Interlingvistoj scias, ke en la rusa eldono de la konata verko de *E. K. Drezen*, kiu aperis en 1928 kaj estis la bazo por la esperantigo „Historio de la Mondo-lingvo“ (Leipzig: EKRELO 1931 kun postaj represoj) troviĝas enkonduko de Marr (kp. Ipl 53).

Antaŭ nelonge aperis antologio kun la prelegoj de la kolokvo:

Sériot, Patrick (2005, Eld.): Un paradigme perdu: la linguistique marriste. (Cahiers de l'ILSL 20). Lausanne: Université de Lausanne. Institut de Linguistique et des Sciences du Langage, 392 p., IBN 2-9700468-6-5.

De interlingvistika intereso estas jenaj artikoloj:

- *Sergej N. Kuznecov*: La langue internationale et la révolution mondiale (p. 143-159)
- *Sébastien Moret*: Marr, Staline et les espérantistes (p. 199-214)

3.8 Pri stilfiguroj en la poezio de Esperanto (Till Dahlenburg)

Libroj, kiuj traktas la specifajn esprimilojn, kiujn dum sia evoluo akiris Esperanto, estas aparte gravaj, ĉar ili pruvas per lingvistikaj argumentoj la naturecon kaj vivantecon de la planlingvo. Al la diversaj verkoj pri tio (i.a. de Sabine Fiedler) aldoniĝas nova grava materialo.

D-ro Till Dahlenburg esploris amason da originalaj kaj tradukitaj poemoj en Esperanto laŭ la tie uzitaj stilfiguroj.

La rezulto estas bele eldonita libro, kiu ne nur enkondukas en ĝis nun neprilaboritan terenon, sed ankaŭ estas konstruita kiel vortaro. Multaj klarigoj, bone elektitaj ekzemploj el la esperanta poezio kaj indeksoj donas al la libro apartan valoron:

Dahlenburg, Till-Dietrich (2006): „Pli lume la mallumo zumas...“ Stilfiguroj en la poezio de Esperanto. Esperantlingva vortaro kun difinoj kaj ilustraĵoj el la internacia poemkreado. New York: Mondial, 215 p.

3.9 Romano pri kaj kun Volapük

Antaŭ nelonge aperis jena kurioza libro:

Drummond, Andrew (2006): „A Hand-Book Of Volapük“. Edinburgh: Polygon, 315 p. ISBN 1 904598 67 6.

Temas pri fikciaĵo sed kun multe da Volapuko en la teksto. Jen la klariga teksto, kiun liveris la eldonejo:

VOLAPÜK was a constructed language created in 1880 by Johann Martin Schleyer, a Roman Catholic priest in Baden, Germany. Schleyer felt that God had come to him in a dream and asked him to create a universal human idiom understandable given God's attitude to Babel, and the confusion of tongues therein. Amazingly enough, Volapük conventions took place all over Europe and by 1889 there were an estimated 283 clubs, 25 periodicals in or about Volapük and 316 textbooks in 25 languages. Although the scheme came to nothing, the idea of a universal language so well demonstrates the late Victorian endeavour, earnestness and optimism that Andrew Drummond of Edinburgh felt compelled to create a novel about its growth (or lack of it) in Scotland.

A Hand-book Of Volapük concerns the efforts of Mr Gemmel Justice, a fervent campaigner for Volapük, and the many trials he faces - largely at the hands of his arch enemy Mr Bosman, the chain-smoking champion of Esperanto. What follows is an elegant series of wild misadventures, most of which are guided by Drummond's pièce-de-résistance, a four-hundred-year-old Sir Thomas Urquhart, inexplicably alive and constantly randy.

It is difficult to conceive of the ambition Drummond brings to this novel.

The book is framed with a traditional mystery, complete with body parts, a swooning maid and a mysterious message. In between come characters both fictional and real with bizarre inventions and "improvements" wielded by Victorian men of the highest scientific purpose. To top this, the novel comprises a complete manual to Volapük, allowing readers to savour the mania of its narrator, and even read and speak Volapük if they wish. The real commingles with the unreal throughout. The British census of 1891 is debunked and debased; Sherlock Holmes hovers, threatening to enter the novel and resolve its secrets; and occasional references to the (fictional) University of Fraserburgh betray Drummond's learning and sense of humour; such a university was actually permitted in a Royal Charter of 1592, although those who have seen modern Fraserburgh will truly relish the comedy of such an institution. It is important to mention that above all, A Hand-book Of Volapük is a bloody funny romp around the coast of Scotland, loaded with cross-dressing misadventures in boats, in the air and in the lodging houses and meeting rooms of Edinburgh.

The best fun is reserved for the bizarre environs of the Mavisbank Private Lunatic Asylum at Lasswade, where Justice, Bosman and Urquhart disembark for comic capers above and beyond the call of language. Language is a great subject for Drummond as he is clearly a master of it, so much so that he can spend his time on creating new ways to fool, beguile and wow readers. His touch is deft. In the eyes of the narrator, Esperanto is "a farrago of grammar and vocabulary" whereas Gaelic is "the dead voice of a pitiful breed in a moribund part of the wiser world".

This is a lively book, sparkling with wit and ideas, but it is also no-mean commentary on an era when Scots such as Livingstone, Muir and Carnegie were the tip of an iceberg which, beneath the water, held a great deal of sincere and well-meaning silliness.

Peter Burnett

3.10 „La lingvo estas la animo de popolo“ (Baier/Zink)

„Die Sprache ist die Seele eines Volkes“ (La lingvo estas la animo de popolo). Tion almenaŭ asertas la redaktoroj de antologio, kiu enhavas prelegojn pri lingvaj temoj, prezentitaj kadre de aranĝoj de la aŭstra popularkleriga organizaĵo URANIA en Graz, Vintro 2004.

La libro entenas akcepteblan ĉapitron pri planlingvoj de Wilhelm Richard Blier (p. 147-174).

Baier, Wilhelm Richard/ Zinko, Christian (2005): Die Sprache ist die Seele eines Volkes. Die großen Sprachfamilien. Graz: Leykam, ISBN 3-7011-7501-1, 176 S.

3.11 Novaj eldonaĵoj de la Eldonejo Helmut Buske en 2007

La konata lingvistika eldonejo Helmut Buske (Hamburgo), kiu jam eldonis la ampleksan vortaron Esperanto-germana de *Erich-Dieter Krause* kaj la germanlingvan gramatikon de Esperanto de *Dirk Willkommen* en sia lasta prospekto anoncis du novajn eldonaĵojn:

Tio estas la dua prilaborita eldono de la „*Esperanto-Grammatik*“ de Dirk Willkommen. Krome oni anoncas unikan verkon, kiu estos historia mejloŝtono en la leksikografio de Esperanto. Temas pri nova vortaro de Krause:

Erich-Dieter Krause: Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto, ca. 1650 S., ISBN 3-87548-466-5. Se oni antaŭmendas: ĉirkaŭ 98 EUR; ekde 1-a de julio en 2007 ĝi kostos 128 EUR.

En la prospekto ni trovas jenajn informojn:

La ĝis nun tutmonde plej ampleksa dulingva vortaro de Esperanto (por germanoj), kun ĉirkaŭ 1650 paĝoj, entenos proksimume 160 000 artikolojn kaj parolturnojn. Ĝi enhavos la kompletan leksikon de la ĝenerala lingvo kun multaj kunmetaĵoj kaj apliko-ekzemploj. Krom tio la vortarego enhavos multajn bazajn fakvortojn el ĉiuj fakoj. Ĉe la fakvortoj el botaniko, zoologio kaj medicino la uzanto ankaŭ trovos la latinajn terminojn. La aŭtoro ankaŭ konsideris la lingvo-uzon en Aŭstrio kaj Svisio kaj diversajn germanajn regionismojn. Geografiaj nomoj, propraj nomoj kaj mallongigoj estas alfabeto enordigitaj

La vortaro estas rezulto de tridekjara leksikografia laboro, dum kiu la aŭtoro eluzis ampleksajn tekstkorpusojn, inter alie de periodaĵoj el la tuta mondo, tiel ke ankaŭ ekstereŭropaj influoj al Esperanto trovis konsideron. La klara strukturo de la artikoloj, la detalaj fakaj klarigoj kaj adlonaĵoj el la vortaro faros fidindan helpilon. Oni atentis la novan germanan ortografion.

4 Projekto de enciklopedio pri la originala Esperanta literaturo

Geoffrey Sutton

Jen prezento de projekto, kiu okupas min jam dum preskaŭ ses jaroj. Temas pri *Konciza Enciklopedio pri la originala Esperanto-literaturo 1887–2007*, sed en la angla lingvo.

Eble oni demandas, kial en la angla, kaj ne en Esperanto. La simpla respondo estas ‘por informi’. Temas pri informado. Tio estas la centra celo de la laboro. Ni bezonas tian libron ankaŭ en Esperanto, sed tio ne estas la celo. Cetere, en Esperanto eventuale temus pri iom alispeca libro.

Ni forte bezonas tiajn fundamentajn konsultlibrojn, t.e. nacilingvaj verkoj pri plej diversaj aspektoj de Esperanto, la kulturo kaj la movado.

Oni ja kompreneble povus aperigi bonan nacilingvan broŝuron pri la Esperanta literaturo, sed tio, laŭ mi, kvankam ĉiel aprobinda kaj apogenda, ne portus sufiĉan prestiĝon.

Nia literaturo estas io konkreta kaj reala, kaj cetere iel sendependa de la prilingvaj argumentoj.

En la angla, ekzemple, ekzistas enciklopedioj pri, ekzemple, la franca literaturo, la germana literaturo, aŭ pri la sud-amerikaj literaturoj. Ni havu apud ili volumon, ankaŭ dikan, kompareble prestiĝan, kiu atestas pri nia ekzisto, nia vivo, kaj invitas al foliumo desur la sama bretaro. Tio sendube povus esti unu elstara reklamo por ni.

Ne plu temas pri projekto. La verko jam ekzistas en kompletigota formo. Ĝi kredeble ampleksos pli ol 500 paĝojn. Ĝi enhavas antaŭparolon, ĝeneralan enkondukon, kaj al ĉiu unuopa periodo de la Esperanta literaturo estas aparta enkonduko. Post ĉiu ĉi enkonduko aperos laŭtempa serio de artikoloj pri ĉiu unuopa grava verkisto ekde Zamenhof. Temos pri nomo, datoj, mallonga vivhistorio kaj priskriboj de originalaj verkoj.

Ĉi tiu parto kompreneble estas la plej ampleksa kaj inkluzivas literaturan kritikon, citaĵojn el verkoj de konataj kritikistoj kaj el recenzoj ks.

Kvankam la libro ne unuavice temas pri tradukoj, ĝi ja listigos la plej gravajn tradukojn de la listigitaj originalaj verkistoj. Estas al mi tre grave, ke ĉi tiuj tradukoj havu laŭeble plenajn bibliografiajn detalojn. Ekzemple, oni nepre sciu la titolon de la tradukita libro en la origina lingvo (tiaj mankoj ĉe tre multaj esperantaĵoj tre malvalorigas ilin, ĉar la mankaj informoj ne estas uzablaj ekster niaj rondoj).

Krome aperos informoj pri eventualaj ne-Esperantaj verkoj de la koncerna aŭtoro kaj informoj pri verkoj pri la aŭtoro kaj pri ĉi ties verkoj ankaŭ nacilingvaj.

Fine aperos koncizigita bibliografio de la originalaj Esperantaj verkoj de la aŭtoro, kaj kompreneble, fine en la libro, aperos detalaj bibliografioj pri ĉiuj menciitaj verkoj.

Tre grava estos tre detala indekso. Kaj aperos diversaj apendicoj. Ekzemple, aperos mallonga ŝlosileca prezento de la gramatiko de Esperanto enkonduke al abundetaj specimenaĵoj el la originala literatura.

Kiel oni decidas, kiun inkluzivi kaj kiun ne? Ne ĉiam facile, estas la respondo! Oni ne rajtas limigi la originalan Esperantan literaturon kiel nuran beletron. Ekzemple, la verkoj de Ivo Lapenna estas grava kontribuo al nia originala literaturo, kvankam ili ne estas beletraj. Aliflanke mi ne inkluzivas natursciencajn nek pure lingvistikajn verkojn.

Se iu verkis unu poemaron sen apartaj laŭdoj de konataj recenzintoj aŭ kritikistoj, tiu kredeble ne troviĝos en la enciklopedio. Se aŭtoro publikigis du poemarojn, kredeble aperos iom pli ol mencio.

Kiel oni povas imagi, estas granda problemo rilate al aperoj en gazetoj. Se oni ĝenis sin aperigi kolekton de verkoj el la gazetaro, la koncerna aŭtoro kredeble aperos. Ja facile povas esti, ke multaj gravaj gazet-artikoloj restos netrafitaj, sed la enciklopedio estas konscie nomita konciza; ĝi estos ampleksega, sed ne kompleta.

Ĝi celas doni al neesperantistoj detalajn informojn sur profesia nivelo, kiu eventuale konduku al plia esplorado – kaj ĝi donos la necesajn informojn por tiu plia esplorado.

Plia granda helpo por decidi, ĉu menciigi gazete aperintan verkon aŭ ne, estas antologioj. Se, ekzemple, aperis verko en grava antologio, mi konkludas, ke ĝi estas listiginda. Aliflanke, se kontraŭ tio, tiu aŭtoro apenaŭ aperas aliloke, mi foje tamen lin aŭ ŝin forigis.

Kiel jam indikite, mi ne inkluzivas homojn, kiuj sole tradukis, kvankam estas tre malmultaj esceptoj, ekz. Kabe, kiu apenaŭ verkis originale, kaj Ivo Rotkvić, kiu tamen meritas mencion pro la influo de sia traduko de Cezaro.

Mi jam ricevis elstaran kunlaboradon de pluraj personoj tra la mondo, pro kio mi elkore dankas. Mi serĉas ankoraŭ multe pli da kunlaboro. Povas esti, ke vi estas konata literaruristo kaj scivolos, kial mi ne kontaktis vin. Nu, tio kredeble venos. Mi estas unu-sola homo, kiu malrapide prilaboras aferon post afero – kaj mi nepre ne deziras krei temporaban administradon. Interesitoj bonvolu kontakti min rete al gsutton@macunlimited.net (kun klara indiko en la titolo por ne forviŝiĝi kiel spamaĵo).

Kiu eldonos? Tio memkompreneble estas la gravega demando. Mi tamen opinias, ke ne estus tute saĝe pridiskuti la aferon en la nuna stadio. Mi simple diru, ke ekde la komenco ekzistas plano kun pluraj eblecoj. Mi absolute ne dediĉus jarojn de mia vivo al la afero, se mi ne kredus je eldoniĝo, kaj mi bone konscias, ke ankoraŭ pli grava ol eldoniĝo estas la distribuado de la libro.

Kaj ĉi-rilate, pri la distribuado, mi ŝatus diri kelkajn gravajn vortojn. Tutcerte granda parto de la distribuado dependos de la kunlaboro de esperantistoj tra la mondo. Mi petas, ke vi siatempe interesiĝu pri la afero.

Ankoraŭ pli, mi petegas, ke oni ne rigardu la aferon kiel sole de anglalingvaj landoj. Oni ĉie instruas la anglan, kaj kiel ajn oni sintenas al tio, ni ĉi-afere utiligu tion por nia celo. Ĉu ne estus bele, se sur la biblioteka bretaro de ĉiu altlernejo kaj de ĉiu universitato sidus bela dika volumo pri la originala Esperanta literaturo. Tio estas mia celo. Tia libro kriegus al la kleruloj, ke ili devas trakti la aferon serioze.

Kiam la libro eldoniĝos? Tio kompreneble ne estas facile respondebla demando. Mi prognozas, ke ĝi aperos post du, aŭ eble pli kredeble tri jaroj.

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperanto.org. ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 56 742, dblanke.gil@snafu.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur disketo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantaj bonvenas.
